

KOLEKTO DE FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO

21


Joël THÉZARD



POLUSAJ GLACIOJ
SUB
NOKTOMEZA
SUNO

VOJAĜNOTOJ ILUSTRITAJ PER 30 LAŬNATURAJ DESEGNOJ,

FOTOJ, AKVARELOJ KAJ DU KARTOJ



SOCIÉTÉ FRANÇAISE POUR LA PROPAGATION DE L'ESPERANTO

34, RUE DE CHABROL

PARIS (X^e)

*Al Sinjoro Dario Rodriguez
miajn dankejn.*

M. Ducloux

**POLUSAJ GLACIOJ
SUB NOKTOMEZA SUNO**



**FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO**
HISPANIK ESPERANTO-FEDERACIO

6781

16 x 2016 helo 006781

DE LA SAMA VERKISTO

ESPERANTLINGVE :

<i>Polusaj Glacioj sub Noktomeza Suno</i> , vojaĝnotoj ilustritaj per 30 laŭnaturaj desegnoj, akvareloj kaj fotoj kaj du kartoj	6 frfr.
<i>La Bela Historio de Jozef</i> , teksto de Zamenhof, ilustrita per 25 desegnoj de Joël Thézard	6 »
<i>La Sentencoj de Salomono</i> , teksto de Zamenhof, luksa eldono, ilustrita per 32 desegnoj	<i>Baldaŭ aperonta.</i>
<i>La Desegno per la Desegnado</i> , 12 lecionoj, 100 fig., 100 gradigitaj ekzercoj	<i>Baldaŭ aperonta.</i>

ILUSTRITAJ VERKOJ SEN TEKSTO

AŬ KUN TRE MALLONGA FRANCLINGVA TEKSTO :

<i>De Alĝero al Marakeŝ</i> , albumo de 100 laŭnaturaj desegn.	12 »
<i>Arabeskoj</i> , 50 nordafrikaj skizoj	10 »
<i>La Dimanĉa Alfabeto</i> , 100 bibliaj desegnotaj kaj kolorigitaj bildoj, 2-a eldono	5 »
<i>En la lando de Tut-Ankh-Amon</i> , <i>Mosea Infanaĝo</i> , 25 egiptaj frisoj, 2- koloraj, luksa eldono.....	20 »

FRANCLINGVE :

<i>La Desegno per la Desegnado</i> , 12 lecionoj, 80 fig., 100 gradigitaj ekzercoj	6 »
<i>La Fabeloj de l' « Ora Cirklo »</i> , il. per 30 des.....	7 »
<i>La Kuirknabo de Henriko 4-a</i> , romano il. per 16 des....	10 »
<i>La Maristeto de la pirato</i> , historia romano de la 16-a jarcento, il. per 20 desegnoj	10 »
<i>La Monero el Arĝento</i> , historia romano de la « Nuligo de l'Edikto de Nantes », il. per 30 dokumentaj des....	10 »
<i>La Ora Lunarko</i> , marokaj fabeloj, il. per 15 des.....	7 »
<i>La Sentencoj de Salomono</i> , luksa albumo, il. per 25 des.	7 »
<i>La Paraboloj</i> , ilustritaj per 100 desegnoj	7 50
<i>La Bela Historio de Jozef</i> , okbilda	3 »

*
**

Aliajn verkojn de Joël Thézard, vidu en la piednotoj de ĉi tiu broŝuro.

*
**

Haveblaj ĉe EDITIONS ARTES-TULÉ, 25, rue de la Terraudière, NIORT (Deux-Sèvres), Francujo.

Joël THÉZARD




POLUSAJ GLACIOJ
SUB
NOKTOMEZA
SUNO

VOJAĜNOTOJ ILUSTRITAJ PER 30 LAŬNATURAJ DESEGOJ,
FOTOJ, AKVARELOJ KAJ DU KARTOJ

*Al René MALAN,
ŝia iama instruisto
nuna kolego
ĉiama amiko.*

S. F. P. E.
34, RUE DE CHABROL
PARIS (X^e)




Karto de la Vojaĝo en la Polusaj Regionoj
Krozado de « Fuko »

AL LA NOKTOMEZA SUNO

Vojaĝinte la pasintan someron en polusaj regionoj, mi ĉi tie grupigas la parton de miaj ĉiutagaj notoj, kiu koncernas la polusajn glaciojn kaj la noktomezan sunon (1).

Sabaton, 8-an de julio. — Nia ŝipego *Foucauld* (2), cent kvindek du metrojn longa, eliris el la franca haveno *Dunkerque* hieraŭ vespere je la dudek-kvara, aŭ hodiaŭ matene je la unua minuto de ĉi tiu sabato.




« *Fuko* »

(1) *La franca rakonto de tiu vojaĝo ĝis la bankizo, en Spitsbergo kaj Skandinavujo, ĵus aperis : tiu Vojaĝo en la Polusaj Regionoj (232 paĝ., 70 fig.) estas aĉetebla ĉe la Eldonejo ARTES-TUX, por dek du frfr. Por esperantistoj nur dek frfr. Aldonu la dek procentojn por sendokosto.*

(2) *Prononcu : Fuko.*

Laŭirinte la sudparton de Anglujo, ni ankoraŭ ne estas antaŭ la Terfina Promontoro, kiam ĉirkaŭ la dudek-unua subiras la suno.

Dimanĉon, 9-an. — Ni lasis maldekstre Irlandon, kaj ĉe la noktigo ni estas antaŭ Man'a insulo, norde de Irlanda Maro. Ĉirkaŭ la dudek-dua subiras la suno.



Haveno de Thorshavn. (Feroaj Insuloj.)
(Laŭnatura akvarelo.)

Lundon, 10-an. — Dum mateno ni lasis dekstre Skotlandon, kaj dum posttagmezo Hebridajn Insulojn.

Je la dudek-dua kaj duono subiras la suno.

En la kajuto, je la dudek-tria kaj kvarono, estas ankoraŭ sufiĉe hele, por ke oni povu, sen elektra lumo, legi apud la fenestro.


Mardon, 11-an. — Travido de la Feroaj insuloj kaj de la ĉefurbo Thorshavn.

Vespere, marmeze, je la dudek-tria kaj duono estas ankoraŭ hele.

Merkredon, 12-an. — La tutan tagon ne vidinte teron, ni ŝipiris al Islando.

Malantaŭ nuba vualo subiras la suno. Post kvaronhoru, noktomeze, mi supreniras mian liteton, konstatinte ke vere ne plu estas nokto : estas hele, oni povas legi ekstere.

Antaŭ kvaronhoru ĵus subiris la suno ; post kvaronhoru ĝi tuj levigis.



Ondverdarnos'a Monto, ĉe la Rejkjavik'a golĵeto

Ne tute ankoraŭ estas la noktomeza suno ; sed jam estas ĉiama lumo.

Ĵaŭdon, 13-an. — Hodiaŭ Rejkjavik'on, Islandan ĉefurbon, ni travidis. Ni ankaŭ vidis la Gryla'n gejseron, faman kaj vidindan intermitan ŝprucakvon.

Kiam vespere ni eliras el la haveno, ni vidas la alian

flankon de Faxe golfeto (1), kaj ĝiajn malproksimajn montojn. Ĉirkaŭ la dudek-tria kaj duono, bela monto, kun formo de japana vulkano, staras ĉe la fino de longa promontoro : estas Ondverdarnos, kies supraĵo estas kovrita de neĝo, kaj kiu montras bluetan silueton antaŭ la roz- kaj oranĝkolora sunsubirejo...

Tiuj sunon mi desegnas je la dudek-tria kaj kvardek kvin minutoj : estas la *preskaŭnoktomeza suno* !

 II

TRANS LA POLUSAN CIRKLON

Vendredon, 14-an. — Elirinte hieraŭ vespere el Rejkjavik, ni dum la ĵusa hela « nokto » ĉirkaŭiris la grandan malproksiman Islandon. Ni laŭiris ĝiajn okcidentajn bordojn kaj ŝipas norden.

Je la dek-kvara horo, kiam ni apenaŭ preteriris la Islandan Nordan Promontoron, eksonoro de la ŝipsireno nin informas pri la transpaso de l'polusa cirklo, ĉe 66° kaj duono de norda latitudo.

Kaj vespermanĝe, oni al ĉiuj disdonas falspergamenan diplomon. Tiu papero estas ornamita, supre, per la karto de la regionoj, kiujn trapasas la polusa cirklo, kaj, malsupre, per nia ŝipego *Fuko* naviganta antaŭ la bankizo kaj antaŭ blanka urso. Meze, la enskribo :

Ni, Nepluno,

Filo de Kronos kaj de Rhea, mastro de l'maroj, de l'ventoj kaj de l'ŝtormoj.

Atestas, ke Sinjoro Joel Tezar estis rajtigita, per eksterordi-

(1) Tie dum oktobro 1936 pereis kun ĉiuj homoj krom unu la ŝipo Pourquoi-Pas ? de la scienculo Charcot.

nara favoro, transiri la parton el nia imperio kuŝantan trans la arkta polusa cirklo, je 67° de norda latitudo.

Elliverite sur Fuko, de l'Kompanio de l'Kunigitaj Sargistoj, la 14-an de julio.

Kaj la kuriersĉipa stampo kaj la subskribo de l'ŝipestro Pol Ferbos, aŭtentikigas la Neptunan parolon.

Krom la observoj pri la pentrindo, kiujn mi intencis fari dum tiu vojaĝo, krom la notoj, skizoj kaj akvareloj, kiujn mi esperas fari dum nia ŝipkrozado, mi ankaŭ esperis fari du kontrolojn tute malsamajn :

1-e. — Mi volus noti, kian specon de kurbaĵo trakuras la suno en la regiono de l'noktomeza suno, en kian direkton ĝi iras, ktp. Tiujn precizaĵojn neniam priskribis vojaĝantoj, kies rakontojn mi legis. Dum la kelkaj baldaŭaj tagoj, mi havos la okazon studi la temon.

2-e. — Mi konstatis, dum vojaĝo al Oriento ĝis Egiptujo (1), ke la polusa stelo tie montriĝas multe pli malalte ol en Francujo. Tial mi esperis observi kompare la grandan altecon, je kiu ĝi devas esti vidata en tiuj nordaj regionoj.

Nu, de post kelkaj tagoj, mi komprenas, ke ĉi tiu dua observo estas kaj estos tute neebla. De post du aŭ tri tagoj, ĉe la nordo de Skotlando, en Feroaj insuloj, ĉe l'Islanda sudo, la nokto estis tiel mallonga, ke ĝi fariĝis nur pli kaj pli mallonga krepusko, — kaj de nun la suno ne subiros plu ! La polusa cirklo estas la limo, kiu markas en la nuna sezono la komencon de l'ĉiama tago : stelojn oni plu neniam vidas !

Hodiaŭ vespere, la unua kontrolo estas neebla : nuboj nepre malhelpas ian ajn observadon noktomeze ; kaj ĉe la horizonto nenie ni ekvidas signon de l'pseudosunsubiro, kiun ni atendas. Cetere ŝajnas, ke la plimulto el la vojaĝintoj, kiuj iris al Norvega

(1) *Legu Ĉirkaŭ Tiberiada Lago, franca teksto, vojaĝnotoj ilustritaj per 50 laŭnaturaj desegnoj, kaj 1 karto. Ĉe la Eldonejo ARTES-TULÉ : 10 frfr. Por esperantistoj, nur 9. Aldonu 10 % por sendkosto.*

Norda Promontoro — kien oni ĝis nun iris por vidi la noktomezan sunon — vidis noktomeze nur nebulon. Sed tion ili ne diras!

Ni, laŭ la programo de *Fuko*, ĉeestos dum dek tagoj transe de la polusa cirklo : espreble ni do havos la okazon vidi la fenomenon.

Atendante, ni kuŝiĝas, je la unua matene, en plena heleco. Kovrita estas la ĉielo, kiu konfuze lumigas kvazaŭ ekranon.

Ĉe la horizonto kurioze koloraj estas la nuboj : tri strioj grizblua, blanka kaj rozaj, preskaŭ la franca flago, kredeble pro la hodiaŭa nacia festo !

III

INSULO DE L'ARKTA GLACIA OCEANO

Sabaton 15-an. — Ni estas meze de l'parto de Arkta Glacia Oceano, kies okcidenta limo estas Grenlando, orienta limo Norvegujo, suda limo Islando, kaj norda limo Spitsbergo.


De la dek-naŭa ĝis la dudek-kvara, ni preteriras la insulon Jan-Majen, kiu apartenas al Norvegujo. Ĝia geografia situacio estas 71° de norda latitudo (kiel la Norda Promontoro de Norvegujo) kaj 8° de okcidenta longitudo. Ĝi estas kvindek kilometrojn longa, de la sudokcidenta promontoro aŭ Jolinet Promontoro ĝis la nordorienta fino, kie staras la vulkano Berenberg.

Ĝi estis ekvidita unuafoje de la nederlanda ŝipisto Hudson, en 1607. Post kvar jaroj, Jan-Majen ĝin retrovis kaj donis al ĝi sian nomon.

Nun, nur tri homoj tie loĝas : sismologiisto, radiotelegrafisto kaj kuiristo, kuraĝaj loĝantoj de soleca, senarba, eĉ senherba, nebulega lando. El nia ŝipego *Fuko* ni kun ili interkomunikas per radio, poste per nia ŝipsireno kaj iliaj raketoj, fine per flagoj.

Je la dudek-kvara, dum kelkaj minutoj Berenberg sin montras kaj proponas por desegno kaj fotografo.

Tiu belega vulkano estas milnaŭcent metrojn alta. Ĝi estas kovrita per neĝo kaj per glaciriveroj, kiuj malsupreniras ĝis



La truita Roko, en la insulo Jan-Majen


(Laŭnatura desegno.)

la maro inter krutaj ŝtonegoj. Kelkaj kaskadoj metas ŝajnan vivon en tiun mortan pejzaĝon.

La kovrita ĉielo estas hela, Malvarmiĝas.

Noktomeze, la ĉielo estas ankoraŭ kovrita ; sed ĉe la horizonto, la blanketa nebula vualo lasas ekvidi strion brilantan kiel fandita oro, dum la maro estas griza sen lumreflekto.

Tiu luma strio iom post iom larĝiĝas ; sed noktomeze la suno mem ne malsupreniras sufiĉe, por ke ni vidu ĝin inter maro kaj nuboj. Kaj ĉar, malantaŭ sia griza vualo, ĝi rekomencas supreniri, ni kuŝiĝas je la unua kaj duono matene.



La vulkano Berenberg, en la insulo Jan-Majen

La fotografantoj tamen uzis la okazon, por fiksi tiun belan lumstrekon super la maro.

IV

ISBERGOJ

Dimanĉon, 16-an. — La logiko estus ja postulinta, ke nur hodiaŭ mi skribu la antaŭlastan frazon de miaj hieraŭvesperaj notoj : « Ni kuŝiĝas je la unua kaj duono matene. » Sed vere la dormo, kaj ne la poŝhorloĝa horo, disigas la tagojn. «

Hodiaŭ matene, la maro estas ĉiam kvieta. Akvo estas palgriza, tre hela.

La laŭtparolilo abunde transdonas al ni muzikon, ve ! tro ofte ameriknegran. Subite, ĝi silentas ; poste :

— Halo ! Halo !

Kaj post teatre plilongigita silento, la voĉo de l'observisto anoncas :

— La unua *isbergo* (1) estas videbla triborde antaŭe.

La laŭtparolilo prononcis angle : « Ajsberg. » Dekstren ĉiuj alkuras.

Kelkajn centojn da metroj de ĉi tie, isbergo paradas majeste. Efektive, ĝi estas kvazaŭe senmova, sed nia movo faras, ke ĝi ŝajnas drivi dekstren : ĝi havas tre karakterizan dentan formon ; ĝia supro estas ja pli alta ol la horizontlinio : laŭ la plej ekzaktaj reguloj de perspektivo, ĝia proksimuma alteco povas esti ok aŭ dek metroj, ĉar ni mem estas ses aŭ ok metrojn super la marnivelo.

Tre rimarkinda estas la koloro de tiu ĉi glacibloko : hela bluo, travidebla, luma, ... nereala.

Maldekstre, tri aŭ kvar fragmentoj de isbergoj, grupe, supren- kaj malsupreniras laŭ ondetoj ; kaj, kvankam pli dikaj

(1) *El du svedaj vortoj, kiuj signifas : glacimonto.*

ol elefantoj, ili ŝajnas malpezaj kiel korkoŝtopilegoj. Sed necesas memori la proporcion de l'enakvigita parto rilate al la elakvigita parto : la glacio internigas en la akvon ĝis la dek dekunuonoj de sia tuta alteco. Tial, tiuj graciaj isbergoj kvar- aŭ kvinmetrojn altaj, kiuj ŝajnas tiel malpezaj kaj tiel facile puŝebleblaj, havas sub akvo kvardek- aŭ kvindekmetrojn profundan mason.

Aliaj pli malproksimaj isbergoj ankoraŭ aperas de tempo al tempo, maldekstre.

Ni iros tiele norden, ĝis ni estos vere haltigitaj de la netransirebla glacibarilo.

Almenaŭ tio estas en la programo de l'ŝipkrozado.

Atendante, trankvile daŭras la ŝipa vivo.

Oni iras serĉi nelegatan libron el la librejo.

Oni daŭrigas la ŝakkonkuradon ; ni estas ok konkurantoj ; diversaj estas la ŝancoj.

Je la dek-sesa, kiel kutime oni manĝetas.

Poste jen la nebulo. Nia ŝipego tre malrapidis. Dange-raj estas la ĉirkaŭaĵoj, ĉar jen estas denove multaj isbergoj.

La ŝipgazeto donis hodiaŭ al ni jenan kuriozan informiĝon: « La suno transpasos la malsupran meridianon je la dudek-kvara kaj dek ok minutoj ; ĝia alteco estos 7°. » Alidirite, la noktomeza suno estos je noktomezo kaj dek ok ! Tio simple devenas de tio, ke la horo de *Fuko* ne ekzakte korespondas kun la preciza horo de l'meridiano, kie ni estas.

Sed en la ŝipkinejo la filmo *Maurin des Maures* venke konkuras kun la noktomeza suno. Tial la suno venĝas sin, tra la nuboj, devigante la kinistojn meti la fenestrokovrilojn, por senlumigi la salonon de la naŭa ĝis la dudek-kvara !

ĈE LA BANKIZO

Lundon, 17-an. — La pasintan nokton, je la tria matene... Estas vere malfacile forgesi la kutimon nomi nokto la tempon de la normala dormo !



Ĉe la glacitarvolego.

Hodiaŭ matene, do, je la tria, estis hele, kiel ĉiam, sed mi dormis. En tiu momento, la ŝipego atingis la bankizon. Kiam mi vekigās, ni estas ĉirkaŭataj per la naĝantaj glacioj.

Ĉirkaŭataj, sed ne blokadataj.

Maldekstre, la bankizo kuŝas ĝis la horizonto. En la apudaĵo de l'ŝipo, ĝi estas dispecita ; pli malproksime, ĝi ŝajnas masiva, kaj ĝi tiele etendiĝas ĝis Grenlando.

Dekstre, la glacia kampo — *ice pack* (1) kiel diras angloj — estas tre rompita, sed la insuletoj estas tiel multaj kaj tiel proksimigitaj, ke la ŝipo ofte estas vere premita de la glacitavolego.

Kompreneble, ĝi iras kiel eble plej malrapide, kaj mi kredas, ke sendanĝere ni ŝipiras, kvankam la ŝipo ne estas konstruita kiel glacirompilo.

Jen ni iras sur la antaŭan parton de la ŝipo. Tie, el la supraĵo de l'pruo, ni vidas *Fuko'n* eniri singarde en la kanaletojn iafoje tro mallarĝajn, inter la glaciaj blokoj. La glacitavolego estas ektuŝata kiel eble plej milde ; ĝi estas malrapide disigata ; ĝiaj partoj plej malfortikaj estas kelkfoje rompataj. Kaj la ŝipo, kiu ŝajnas nevundebla, daŭrigas majeste sian iradon tra la *pack*. Ĝi ĉirkaŭiras la plej gravajn blokojn kaj, zigzage, direktiĝas al la kvazaŭlagoj, kiujn oni tie kaj tie ekvidas en la glacia kampo.

Jen, el la malantaŭa parto de l'ŝipo, ni vidas nian malrektan ĵirsulkaĵon, kiu malrapide fermiĝas, kaj malaperas en la perspektivon.

Mi rimarkas tie, ŝipirante, kelkajn glaciblokojn, kiuj entenas terkolorajn makulojn. Kaj mi supozas, ke tiuj pecoj estas disigitaj de iu malproksima Grenlanda aŭ Spitsberga bordo, kaj mi opinias, ke ili konservis, por la observemuloj kaj la « scienculoj » de *Fuko*, kelkajn specimenojn de bruna kaj foje preskaŭ ruĝa tero.

Mi tion supozas.

Mi tion supozis.

Sed... mi reiras la antaŭan parton de l'ŝipo, kaj mi kliniĝas super la apogbarilo por ĝuste vidi la frapiĝon de l'glacioj kontraŭ la pruo kaj la flankoj de la ŝipo. Kaj mi ekrimarkas, ke la glaciegoj skrapas tre forte la pentraĵon de l'ŝipselo, ruĝan sub

(1) *Prononcu* : ajs-pak.

La akvolinio kaj nigran supre, kaj ke ili forprenas tiun koloron kaj ĝin forportas... por la observemuloj kaj la « scienculoj ».

Iam la ŝipo enigita en tro mallarĝan vojon, ne povas plu antaŭiĝi, kaj devas retroiri : tiu manovro estas farata malakcele, ĉar la glaciblokoj dum tiu retroiro povus danĝere kolizii la helicojn.



Ĉe la glacitavolego

Poste, la maro denove estas senglacia. Mi uzas tiun okazon, por min bani — sed ne en la maron.

KIEL ASPEKTAS LA BANKIZO

Ĉirkaŭ la dek-unua matene, ni pasas ĝistuŝe preter glacitavolego mallarĝa kaj longigita kiel lunarko ĝis la horizonto.

Kaj same, dum la tuta tago, ni renkontas multajn *ice-fields* (1) ; unuj estas preskaŭ masivaj, aliaj dissemitaj kiel pli malpli densaj insularoj.

Preskaŭ ĉiuj blokoj estas nur du aŭ tri metrojn altaj.

La meza dikeco de l'glacibarilo estas tridek metroj. (Ĉe la suda poluso, ĝi estas tricent metroj.) Ebenaj blokoj estas longaj je kvindek aŭ cent metroj ; aliaj pli malgrandaj prezentas neregulan formon, kaj malproksime maldekstre, longegaj glacikampoj sternaĝas seninterrompe.

La supraĵo de la blokoj preskaŭ ĉiam estas iome plilarĝigita kiel fungo ; aŭ pliprecize la maro kavigis la glaĉion, kiel ĝi kavigas la bazon de l'klifoj. Kaj la kvazaŭa submara trotuaro de tiuj ĉi blokoj montras strangajn kolorojn : la verdeta travidebleco de l'akvo surmetiĝas sur la blueti travidebleco de la glacio.

Sed jen la bankizo estas antaŭ ni tiel frunte kaj tiel masiva, ke la ŝipo ne povas ĝin fendi kaj forpuŝi : ĝi suriras ĝin. Ho ! ne tre alte, sed sufiĉe por ke la skuo iome emociu la ŝipirantojn, kiam la ŝipego tuj refalas.

La supraĵo de la glacitavolego tute ne estas glata : ĝi aspektas ŝtonege.

Kelkaj glaciegoj ŝajnas pontoj, grotoj, ktp. Ili estas duondiafanaj, kaj prezentas magiajn kolorefektojn : verdetan bluan

(1) *Angla vorto. Prononcu : ajs-filds : glacikampoj.*

kaj bluelan verdon. Neble estas ilin priskribi per plumo, kaj certe malfacile estas ilin reprodukti per peniko.

La kristala blankeco de la glacio mirinde kontrastas kun la maro jen grafitgriza, jen perlogriza. La ĉielo ĉiam kovrita estas lumgriza ; je la dek-dua same kiel je la dudek-dua, la suno restas super la nuboj. Ĉe la lino de la horizonto, la brilo de la glacitavolego estas stompita per la malproksimeco, kaj fine ĝi preskaŭ intermiksiĝas kun la paleco de la ĉielo.

Dum momento, kiam la maro estas sen glacioj, « S-o Bennett », nia afabla Norvega gvido, paroladas al ni, en la fumejo, pri la glacitavolego, pri Spitzbergo, kien ni estos morgaŭ, kaj pri ĉiuj « arktaĵ » temoj, kiujn oni proponas al li. Bonhumore kaj humure, li liveras al ni interesajn sciigojn. Li parolas tre bone la franclingvon, sed moktude li ŝajniĝas kvazaŭ li hezitus.

Kiam li diras al ni, ke en Spitzbergo ni vidos lokon nomatan Green-Harbour (Verda Porto), li ŝajniĝas hezilon :

— Ĝi estas tre grava ha...

Kaj li haltas.

— ... nejo, subdiras al li tro laŭte bonaĉa, senpripensa kaj helpema sinjorino.

Bennett dankas per kapsigno, ridetas kaj diras :

— Ne : ... lenejo, loko de balena negoco !

VII

KIEL EBLE PLEJ NORDEN

La glacitavolego devenas de la solidiĝado de l'maro. Kial ĝia supraĵo ne estas nepre glata ? Kaj kial male ni vidas sur ĝi tiomajn kavajojn kaj tiomajn tuberaĵojn ?

Tial ke multaj fenomenoj senĉese modifas la reliefon de

la *ice-pack*. Dum la vintro, neĝo falas sur la glacieron, kaj sube la akvo glaciigas. Dum la somero, parto el la glacio forfluidiĝas.

Tiuj varioj de volumeno kaj de pezo rompas la glacibenkon, kaj igas fendojn. En tiujn fendojn eniras la maro. Dufoje ĉiutage alluo kaj refluo frakasas la glacimason. Kaj, dum ŝtormoj, glaci-blokoj estas amasigitaj sur la supraĵon fare de la ondegoj.

Antaŭ la nekomparebla vidaĵo de la glacitavolego, la fotografistoj plengoje fotografas.



La polusa glacitavolego je la tria maŝene.

Kaj la sciemuloj ekvidas — aŭ elpensas — detalojn, kiuj estos propraj memoraĵoj.

Unuj vidas fokojn, iom malproksime, en la ombroj de glaciegoj. Mi ne vidas fokojn, sed kiel ĉiuj mi vidas sur la glacio, tie kaj tie, la lokojn, kie ili restadis, kaj kie ili lasis precizajn... sed tre malpurajn postsignojn.

Sipiranto vidis — asertas, ke li vidis — malproksime, tre malproksime, ĉe la horizonto de la senglacia maro, grandegan balenon... tre malgrandan pro malproksimeco.

Aliaj vidas pingvenojn. Sed la strangetaj birdoj, kiuj staras rektavice sur la glacio, ne estas pingvenoj : estas « marpapagoj ».

La lasta el la arktikaj pingvenoj estis mortigita en 1844. Kaj pajoŝtopite, ĝi staras en Oslo'a Muzeo.

Hodiaŭ, « la suno transpasos la malsupran meridianon je la dudek-tria kaj kvindek kvin. Ĝia alteco estos $11^{\circ}40'$. »

Estas maldika nebulo. La suno, tiun ĉi fojon, aperas proprapersonne kaj ne nur per simpla lumreflekto : jen ĝi traboras la nebulon, pala kiel vintrosuno, blanketa kiel la luno, lumanta sen brilo.

Mi notas ĝian altecon per ĉi tiu esprimado malpli matematika ol « $11^{\circ}40'$ » : mezurante per la brako etendita, kiel faras desegnistoj, mi konstatas, ke inter suno kaj horizonto estas iom pli ol kvin fingroj da larĝo.

Tiun ĉi fojon, ni vidis la noktomezan sunon ; palaĉan, mi konsentas ; sed ni povas diri, ke ni ĝin vidis.

Tio, kion mi ankaŭ vidis, kaj kiam mi esperis vidi, estas la direkto de l'sunirado. Noktomeze, la suno estas plennorde. Pri-pensante, tio ŝajnas tre natura, — precipe, kiam oni tion vidis. Sed mi konstatas, ke nenia libro antaŭsciigis min pri tio. Mi havas poŝkompason : ĝi bone montras la sunon norde. La kompaso de l'ŝipego, sur la malantaŭa ferdeko de l'duaklasa manĝoĉambro, akordas kun mia kompaseto.

Samtempe, mi konstatas, ke, haltigitaj de la netransirebla barilo, ni ĉesas ŝipiri norden.

Ni alproksimiĝis la 80-an gradon de Norda latitudo. Ekzakte, nia ŝipo vojturnis, kiam ni estis je $79^{\circ}45'$. De tie ĝis la poluso, estis nur mil kilometroj. Ĉe la Norda poluso, ni farus kuriozajn konstatojn : ĉiuj direktoj aliras Euden ; kaj turniĝinte du aŭ trifoje, oni ne scius kien aliri, por iri Eŭropon prefere ol Amerikon aŭ Azion !

Ĉe la poluso, ankaŭ, ĉiuhore tage aŭ nokte, suno ĉiam estas sude : ĉiam do estas la dek-dua horo !

Post tiu asertaĵo, kiu ne estas ŝerca, mi fermas tiun ĉi notlibreton.

Enlitiĝo je la dudek-kvara kaj duono. Ŝipdirektiĝo ĝuste suden, al Spitsbergo.

VIII

MAGDALENA GOLFETO, EN SPITSBERGO

Mi ne intencas, priskribi ĉi tie Spitsbergon. Priskribo pri tiu eksterordinara kaj malproksima lando plenigas kvin ĉapitrojn de mia ilustrita verko *Vojaĝo en la polusaj regionoj*, kaj eble formos la enhavon de esperanta broŝuro pli dika ol ĉi tiu.

Tamen mi enmetas ĉi tie kelkajn liniojn pri Spitsbergaj glaciejoj kaj isbergoj.

Spitsbergo havas kvar cent kvindek kilometrojn de longo, de nordo al sudo.

Mardon, 18-an. — Je la dek-dua, *Fuko* ankradas meze de la Magdalena golfeto, apud la nordokcidenta promontoro de Spitsbergo.

Radia la suno, Tre blua, la maro nekredeble similas Mediteraneon. La pintaj montoj (1) estas varmkolore okraj, oranĝaj kaj flavruĝaj. Ĉirkaŭ ni, inter tiuj montoj, glaciejoj montras la bluetan travideblecon de siaj altaj klifoj.

Mire bela estas la vidaĵo. Kaj entuziasmaj estas la plej malpocziemaj pasaĝeroj. Post la longa kaj malgajiga grizaĵo en kiu ni baniĝis, « agrabla estas la lumo, kaj bone estas al la okuloj vidi la sunon. » (2)

La temperaturo estas + 7° en aero, kaj + 10° en akvo.

(1) *En norvega lingvo, Spetsbergen signifas Pintmontoj.*

(2) La Predikanto, XI, 7. *Tradukis Zamenhof. Alia parto de la Zamenhofs Bibliio, La Bela Historio de Jozef, estas mallongigita kaj ilustrita per 12 desegnaĵoj de Joël THÉZARD. Esperanta Teksto.*

Ĉe la glacitavolego, ni havis « nokte » kelkajn gradojn sube de 0° , kaj « tage » 2 aŭ 3° supre.

De la antaŭa ferdeko de *Fuko*, mi unue pentras la Gule'an glaciejon.

Elŝipiĝinte apud la Adam'a glaciejo, mi sidiĝas sur ŝtonbloko — kaj pentras.



Spitsbergo, Magdalena Golfeto.

La Gule'a glaciejo.


La fundo de l'golfo prezentas ultramarbluan akvon, iafoje strekitan de hela bluo, kaj ĝi mirege estas kadrita per orkoloraj montoj.

La ŝtonplena antaŭaĵo estas kruta deklivo garnita de disfalintaj rokoj, de neĝo... kaj de moviĝemaj kaj bruaj turistoj: dum kelkaj horoj, tiu ĉi dezerta angulo retrovis vivon. Efektive, la pejzaĝo estas senkreskaja kaj tute dezertaspekta; sed la lumeganta suno ĝin igas belega argenta, ora kaj lazura pejzaĝo: tia estas la Spitsberga koloraro.

La glaciejo, kiu estas funde de la Magdalena golfeto, kaj kiu

kuŝas meze de mia akvarelo, havas nomon, kiu angle signifas Vagona-Vojo. Ĉar la Angloj tie pasis, ili estus devintaj doni al ĝi pli poezian kaj pli lokan nomon !

Eble mi estas la unua akvarelisto laboranta sur tiu ĉi Spits-



Spitsbergo, Magdalena Golfo. — La Waggon Way'a glaciejo.

(Laŭnatura akvarelo.)


berga tero ; kaj la grandvalora memoraĵo, kiun mi tuj alportis, konsolas min pri piedmalvarmo ! Mi sidas plenasune, turnante dorson al lumo por ombri mian paperon : tion konsilas ia dekleciana *Akvarelo* (1), kiun mi bone konas, kaj kiun mi

(1) Franca teksto, koloraj modeloj. Ĉe Editions ARTES-TUÉ: 10 frfr. Por esperantistoj, nur 8. Aldonu 10 % por sendkosto.

nepre volas rekomendi al liuj, kiuj legas miajn notojn kaj deziras pentri.

Post la ekskurso al la suda bordo de la Magdalena golfeto, ni reenŝipiĝas per la *Fuko'aj* kanotoj.

Ni tuj foriros.



La Adam'a glaciĉjo, en Spitsbergo.

(Laŭnatura akvarelo.)

Sed antaŭe... mi kredeble havos la tempon por fari alian akvarelon pri la Magdalena golfeto : por tio mi estas ĉi tie !

Mi sidas en la vitrita galerio de l'unuaklasa funejo. Vitraĵon mi mallevas por pli bone vidi, kaj mi pentras la Adam'an glaciejon, el kiu ni alvenas.

Mi pentras la malgrandan rondforman monteton, kie antaŭ unu horo mi sidis ; honore al la heroo de moderna fabelo,

mi nomas ĝin... Copain-Cop (1). Mi pentras la montmason, kiu superstaras apud ĝi, kaj la netajn malproksimajn pintojn, kies mirinde skulptitaj akraĵoj jetas sur la neĝon belegajn bluetajn ombrojn. Mi pentras ankoraŭ la nubon, kiu dekstre kaŝas la komencon de la glacirivero kaj la brillhuan spegulglatan maron.

Pli precize ankoraŭ ol la jusa pejzaĝo, tio estas Spitsberga harmonio : lazur-, or-, arĝentkoloroj.

Mi laboras. Mi atente kopias mian glaciejon kaj... jen ĝi estas en mia kartono, kiam ni deankriĝas.

IX

LA SPITSBERGA SPEKTRO

Elirinte el la belega Magdalena Golfo, ni preteriras la bordon de la Sep Glaciejoj, kaj ni eniras nebulegon.

Kaj tie, kiam ni pensis povi nenion observi, tiam ni vidas tre maloftan vidaĵon : estas la eksterordinaregaĵo, kiam la prizifikaj fibroj priskribas kiel « Broken'an spektron ».

Estas ion antaŭ noktomezo. Mi staras ĉe la dekstra angulo de la supra malantaŭa ponteto. En la nebulego, oni nenion distingas je ducent metroj antaŭe : maro kaj ĉielo sendiference konfuziĝas unu kun la alia.

Mi rigardas antaŭen, proksimume suden ; la suno estas malantaŭ mi, preskaŭ norde. Jen tiam ekaperas la « spektra ».

(1) Copain-Cop *francinge signifas proksimume* : *Kooperativa Kunulo*. La Aventuroj de Copain-Cop formas porinfanan ilustritan albumon desegniton de Joël THÉZARD. 5 frfr. Ĉe Editions ARTES-TUÆ.

Antaŭ mi, iom pli malalte ol la horizonto, mi ekvidas sur la nebulmuro mian ombron, kies silueton mi tre perfekte rekonas.

Mi levas brakon ; ĝi levas brakon.

Mi eligas mian skizolibreton kaj mian fontoplumon ; la ombro



La Spitsberga spektro

kompreneble faras la saman geston. Proksime de ĝi montriĝas la ombro de la ferpaliso, kiu apudestas al mi. (Tiu paliso, kiam *Fuko*, ŝipiras en la sunlandoj, subtenas tendon.)

Ĉirkaŭ tiuj du siluetoj brilas ĉielarketo, kiu — se oni tion

povas diri — estas tuta cirklo ; ĝi estas du- aŭ trioble pli alta ol mia ombro. Ĝi estas kolorita laŭkutime, per la sep laŭregulaj koloroj.

Alia senkolora ĉielarko, brila aŭreolo formas duan rondon. Ĝi havas la saman centron kiel la unua, sed ĝi estas multe pli vasta : ĝia radio estas ĉirkaŭe sesoble pli granda, probable egala je la ordinara ĉielarko.

*
* *

Draman historion pri simila temo enmetis Zamenhof en sian *Fundamentan Krestomation*.

Estas sveda rakonto.

En Ameriko, vagonaro rapidege kurkuris en densa nokta nebulego. Subite la lokomotivestro kun timego ekvidis antaŭ la maŝino grandan dancantan silueton de nigra virino. La superstiĉulo kredis vidi spiriton, spektron, aŭ antaŭsignon, kiu avertas lin pri iu danĝero. La hejtisto ankaŭ vidis la tragediajn gestojn de la terura nigra virino.

Timigita, la lokomotivestro haltigis la vagonaron... antaŭ faŭko, je kelkaj metroj de ponto rompita de la tempesto kaj de la riveraltiĝo.

La du homoj kredis ankoraŭ pliforte, ke tio estas supernatura averto, sed ili baldaŭ vidis, ke la ŝajna nigra virino estas nur la ombro, kiun jetis sur la nebulegon insekto enfermita en la lanterno de la lokomotivo.

*
* *


Mi desegnas la spektron kaj ties du aŭreolojn kaj la apogbarilon, sur kiu mi apogas min. Mi faras lastan adiaŭgeston al mia bildo, kiu same faras... kaj en la maron, antaŭ la Sep-Glacieja Spektro, falas la ingo de mia fontoplumo !

Poste ni eliras el la nebulego, kaj eniras King'an Golfeton.

KING'A GOLFETO, EN SPITSBERGO

Ni estas vespere sur la alia Spitsberga King'a Golfeto.

La ĉielo estas pura kaj hela. Tre alte, tie ĉi kaj tie, kelkaj maldikaj flockaj nuboj ne povas kaŝi la sunon. Kontraŭe super Oceano, ĉe la golfeta eniro, etendiĝas nebula plafono.




King'a Golfeto, en Spitsbergo, sub la noktomeza suno

(Akvarelo de Joël Thézard.)

Sed jen estas la suno ! la noktomeza suno ! brilega, blindiganta, en la blueta ĉielo ! Ĝin rigardi oni ne povas pli, ol belan sunon de nia lando. Ĝi havas la saman radiadon.

Nenia mistera lumeto ; nenia malofta kaj aparta koloreco. Estas la suno tia, kian ni havas en Francujo, oktobre, ĉirkaŭe unu

horon antaŭ ĝia subiro, je kvin fingroj super la horizonto. Sed ĉi tie ĝi ne subiros kaj, je tiu alteco, ĝi havas nepre nenian sunkuŝigan koloron: estas, en sia tuta belegeco, la ĉiama polusa lumo.



La Noktomeza Suno, King'a Golfeto, en Spitsbergo.

(Foto de l'aŭtoro.)

Kaj tiuj vortoj, kiujn mi ĵus skribis, rememorigas al mi la frazon de Jaures, kiun mi iam enmetis en la pejzaĝlecionon de mia Sen-

profesora Desceno (1) : « La belegoj de l'sunoj kaj la mildo de l'noktoj estas ĝuste, kaj ne per vanta figuro, reflekto de l'ĉiama lumo... »

Kiam ni forlasas la ombrajn ŝippartojn, tiu suno donas vere varminpreson, malgraŭ la noktomeza horo, malgraŭ la ĉirkaŭkuŝantaj glaciejoj kaj la isbergoj, kiuj viciras laŭlonge de la ŝipego.

Noktomeze, la jenan foton mi kaptis, melinte antaŭ la objektivo flavan vitron, kiu malhelpis, ke la filmo estu vualita, sed kiu ege malheligis la tutan pejzaĝon.

Kaj mi akvarele pentras tiun belan pejzaĝon, kiu eble estas la plej bela el miaj arklikaj memorajoj : belegaj rokaĵoj kaj glaciaj ebenaĵoj, lumigitaj de la plej mirinda noktomeza suno...

XI

TEMPLA GOLFETO, EN SPITSBERGO

Merkredon, 19-an. — La plej belkolora el la Spitsbergaj fjordoj certe estas la Magdalena Golfeto, kiu ni travidis antaŭhieraŭ. Sed la plej grandioza estas la *Ice Fjord* (esperante : Glacifjordo), kie kuŝas Longyear City, ĉefurbo, la plej norda urbo en la mondo. Tie vivas kvin aŭ ses cent norvegaj ministoj.


Unu el la kuriozaĵoj de tiu *Ice Fjord* estas la Templo golfeto, kies la altaj klifoj estas unu el la plej eksterordinaraj pejzaĝoj en la mondo : ili havas kuriozajn formojn de giganta arkitekturo, turoj, fortikaĵoj, hindaj temploj, babilonaj piramidoj...

(1) *Franchingre, Deh du lecionoj, cent sesdek kvin figuraĵoj; aĉetebla ĉe la Eldonejo, AVRES-TUVE, kun sendkosto, frfr. 5.25.*

Ni ankradas ĉe la fino de tiu Templo golfeto, je cent kilometroj de la maro.

Ĝi estas baxita de grandega glaciejo larĝa je unu aŭ du kilometroj. Estas la Post'a glaciejo, kies fronto klife staras antaŭ ni, kaj montras profundajn fendegojn kaj travideblajn bluecojn.

El la glacieja antaŭĵo elfalas isbergoj. Ili estas glaciablokaj, kies



Templo golfeto, en Spitsbergo


formo ĝenerale estas pli strangeta ol la bankizaj blokoj. La bankizo estas nur glaciita maro, dum la isbergoj — glaci-montoj — estas glaciejaj pecoj falintaj en la maron.

Ĉie ĉirkaŭ ni estas isbergoj. La akva supraĵo tre kvieta, glata kaj griza kiel malnova malbrila spegulo, estas tute dissemita de ili. Ili estas ĉiuformaj ; kaj oni sen troa streĉo de imago rekonas cignojn, fiŝojn, ursojn, leonojn, kastelojn, tablojn, vazojn, statuojn kaj multajn aliajn objektojn.

Ĉiuj havas tiun miregan brilan kaj malvarman koloron, kiun

havas preskaŭ senkolorigita safiro. Sur la perlogriza akvo, ili kelkfoje ŝajnas havi propran lumon, kiel tiuj modernaj lampoj formitaj el kristala bloko lumita, de malsupre, de nevidebla lumfonto.

Marbirdoj ĉirkaŭ la ŝipego flugas, kaj fiŝcasas en la malvarmegan akvon.



Isbergoj.

(Laŭnatura desegno.)

Je kelkaj metroj de la ŝipo, mi ŝance ekvidas junan fokon, kiu preteriras *Fuko'n*, kaj kredeble demandas al si, kia estas tiu granda nigra kaj ruĝa rokbloko, kiun tie li ne konis. Kaj tiu ĉi malgrava okazeto probable estos la temo de historio, kiun kromzadreturinte mi rakontos al du malgrandaj kvarjaraj geĝemeloj, kiuj min atendas en Francujo.


Mi min ŝajnaŭdas :

— Iafoje estis, Jaĉjo, iafoje estis, Monjo, malgranda foko, kiu ne aŭskultis sian patreton, kaj kiu...

Returne de Templo golfteto, la plej longa kaj la plej grandioza fjordo en Spitsbergo, ni eliras el Glacifjordo.

Ni eniras sub nubplafonon, kiu kovras la maron.

Ĉirkaŭ la dudek-tria horo, la suno lumigas oblikve la gla-



Norvega trenreta ŝipo, en la nebulego, antaŭ Ursinsulo.

ciejojn de l'suda bordo ; sed la astro mem estas tro alte super la nubtruo, por esti vidata.

Jaŭdon, 20-an. — Laŭirante suddirekte la Spitsbergan bordon, ni ankoraŭ ekvidas kelkajn isbergojn, kiuj naĝas inter ni kaj tero.

Vespere, ni preteriras la Sudan Promontoron de Spitsbergo. La ĉielo estas kovrita. Klareco, sed suno nevidebla.

Vendredon, 21-an. — Dum la nokto — mi volas diri depost la unua matene — nia radiotelegrafisto kaptis alvokon S.O.S.:

norvega trenreta ŝipo petas helpon por unu el ĝiaj maristoj vundita. Ĝi vokas, ni respondas.

Tra la nebulego, je pli ol cent kilometroj de distanco, la du ŝipoj iras rekte unu al la alia.

Ili trovas unu la alian, apud Ursinsulo. *Fuko* haltas. Maŝinoj silentas. Boato de la trenreta ŝipo estas malsuprenigita sur la maron. La ŝtupetaro de *Fuko* estas mallecvata. La viro enŝipiĝas sur *Fukon*. Ni elŝipigos lin morgaŭ en Hammerfest, kie la malsanulejo ricevos lin.

Hodiaŭ, ni revidis bluan ĉielon.

XII

EN NORVEGIJO

Ĉi vespere, la noktomeza suno okazas je la dudek-dua, kaj kvardek ses, ŝiphore. Ĝia alteco estas nur je 1°54'.

Kun la belaj nuboj, kiuj ĝin kaŝas, tio estas belega subiro de suno, ... kiu ne subirus.

Ni alvenas Nordan Promontoron, ĉirkaŭ la tria horo... de la inorgaŭna sabato.

Sabato, 22-an. — Hodiaŭ matene, ni vizitis Hammerfest, la plej nordan urbon en Eŭropo.

Vespere, ni estas en la fjordo, en la ĉirkaŭaĵo de Tromsø.

Ni pasas antaŭ Lyngsfjorden, mallargan kaj longan golfon, kiu malfermiĝas maldekstre, kaj etendiĝas ĝis cent kilometrojn en la landon.

Sur la bordo staras la belega glaciejo Jørgervasstind, kiun rozigas kaj oras la vespera horo.

Nun ni ŝipiras antaŭ Tromsø.

Kuŝanta sur la malkruta deklivo de sia insuleto, Tromsø certe estos unu el la plej belaj memoraĵoj de nia vojaĝo kaj eble de nia tuta vivo. La urbo, kiu entenas ses mil loĝantojn, ne havas tre rimarkindajn belecon, koloron kaj silueton. Sed la pejzaĝo, kiu ĝin ĉirkaŭas, kaj precipe la krepuskaj lumetoj, kiuj super ĝi ŝvebas, donas al Tromsø superegan, nepriskribeblan belecon.

Norda Promontoro de Norvegujo.

(Laŭnatura desegno.)

Kune kun mia akvarelo, jen estas senlitterature la karakteroj de liu pejzaĝo.

Dekstre, Tromsø kaj ĝiaj multkoloraj domoj, la betuloj de ĝia monteto kaj la arganoj de ĝia haveno.

Maldekstre, en malva nebulo, la malproksimaj disbranĉigoj de l'fjordo.

Antaŭe, violetaj silnetoj de altaj montoj. Sur la plejaltajoj, neĝo estas blua en ombro, roza sub suno.

De supre al malsupre, la ĉielo estas perlamote grizblua, verdeta, orangkolora.

La tuta pejzaĝo reflektiĝas sur la fjordspegulo, kies nuancoj estas agrable irizitaj kaj ĉiuminute aliĝantaj.

Kaj la suno ne volas decidiĝi al subirado. Sur la tuton ĝi almetas kvazaŭ diafanan surkoloraĵon, delikatan varman ornuancon.



En Hemmerfest' a stralo.

Sur la katalogo de « Pejzaĝoj », el kiuj konsistas parto de miaj memoroj, ĉi tiu envidiĝas en la « nekonkureblaj ». « Tio estas subskribita : Dio, » kiel diris la kolektisto Grult, citita de la franca filosofo Félicien Challaye en sia libro *la Arto kaj la Beleco*.

Je la dudek-kvara, la suno kaŝiĝas malantaŭ la montoj. La ĉielo estas tre pura. La lumo estas malforta, kaj jam ne havas la klarecon de Spitsberga noktomeza suno. Sed denove la pejzaĝo tuj rekomencas brilegi, kaj ĝi repasas tra ĉiuj siaj mirindaj fazoj. Kaj, kiel dum la tagoj de l'*Genezo*, « estis vespero, kaj estis mateno, » en kontinua lumo.

Ni kuŝiĝas, post lasta ekrigardo al Aŭroro, kies « fingroj » estas tiel rozkoloraj, kiel dum la Homeraj tempoj.

Dimanĉon, 23-an. — Nuboplena ĉielo. Ni elŝipiĝas en Narvik. De tie, ni ekskursas ĝis la norvega-sveda limo, kaj vizitas, en sveda Laplando, la turist-stacion Abisko.

Ĉe la returniro, akvarelo pentrita sur la kajo de Narvik fiksas por




Lyngsfjordo kaj la Jægervasstind'a glaciejo.

mi la aspekton de l'ĉielo, kiu, vespere, komencas ricevi kolorojn de vera sunsubiro.

Antaŭ mi etendiĝas la granda fjordo, griza sed luma, kie naĝas ĉiuformaj ŝipoj. Tre proksime kuŝas la kaja bordo, kun la ŝnuregoj de la ŝipego kaj la dikaj gisaj alligfostoj.

Dekstre kaj maldekstre, kuŝas la du verdaj marbordoĵoj ; la maldekstra estas punktita de gajaj ruĝaj domoj ; la dekstra estas horizonte tranĉita de fervoja fosaĵo. Funde, tri aŭ kvar planoj da

malproksimaj montoj pasas de la bluviolekoloro al la malvo- kaj al la orkoloro. Sed la precipa pentrajtmo estas la ĉielo tutplena de mallumaj nuboj, kies truoj alte estas blujaj, meze orflavaj, kaj malalte pli kaj pli rozaj.



Tromsø, sub la noktomeza suno.

(Akwarelo de Joël Théard.)

Noktomeze, ni estas en Vestfjordo, ĉe l'unuaj Lofoten'aj insuloj. Ĉielo estas kovrita : suno ne videbla.

Lastafoje, ne subira : la suno : tio estas mia lasta noktomeza suno.

XIII

REE TRANS LA POLUSAN CIRKLON

Lundon, 24-an. — Je la naŭa kaj duono matene, ni transpasas la polusan cirklon, antaŭ Svartisen'a glaciejo.

Post Vegafjordo, la suno subiras kun admirindaj nuancoj, inter belegaj ruĝigantaj nuboj. Sajne ĝi volas kompanse montri



Mia lasta noktomeza suno, en Narvik.

(Akwarelo de Joël Thézard.)


al ni malmoderecon da mirindaj koloroj, kaj nin konsoli pro la perdo de l' noktomeza suno, luma sed teda.

Pli bone ankoraŭ : je la dudek dua, ĝuste kiam la suno tuj malaperos sub la horizonton, ekaperas la verda radio.

Mi aliajn fojojn vidis la verdan radion, sur Mediteraneo, returne el Egiptujo ; kaj en mia libro *la Senprofesora Akva-*

relo (1) — kvinan lecionon, tridekan paragrafon — mi, pri koloro, provis doni de tio klarigon.. kiu ne havus ĉi tie sian lokon.

La suno tre frue subiris, kompare kun la lasta sunsubiro,



Bergen (Norvegujo).

(Laŭnatura akvarelo.)

kiun ni vidis en Islando, ĉar hodiaŭ ni longlonge ŝipveturis suden.

Fine, iom da nokto ni havas. Kaj se « bone estas al la okuloj

(1) *Franca teksto. Dek du lecionoj, sesdek figuraĵoj. Eld. ARTES-TUÆ : dek frfr. — Por esperantistoj nur naŭ. Aldonu 10 % por sendkosto.*

vidi la sunon, » vere estas ankaŭ plezuro, kaj bezono, havi nokton por dormi.



La jaĥto Ora Cirklo, en Sankta-Martino, Ré-Insulo.

*
**

Kaj de la 25-a ĝis la 2-a de la sekvanta monato, nia vojaĝo daŭris tra Aalesund, Merok, kaj ĝiaj fjordoj, Bergen kaj ĝiaj

malnovaj konstruaĵoj, Oslo kaj ĝia golfo kaj ĝiaj vikingaj ŝipoj, Kobenhavn kaj la danaj markoloj, Norda Maro kaj ĝia neevitebla ŝtormo, fine Dunkerque kaj Francujo...

Francujo, kie baldaŭ mi iros tra Parizo kaj Niort, ĝis Ré-In-sulo... kaj *Ora Cirklo*.

XIV

KLARIGOJ PRI LA NOKTOMEZA SUNO

Tamen antaŭ ol fini ĉi tiujn notojn, mi volas ĉi tie aldoni kelkajn klarigajn liniojn pri la noktomeza suno.

Ni restadis de la 14-a de julio ĝis la 24-a en nepre senĉesa lumo : unu tago de ducent sesdek kvar horoj ! Alkalkulante la mallongajn noktojn duonhorajn kaj unuhorajn, kiuj antaŭis tiun periodon, ni havis dek tri aŭ dek kvar ĉiamlumajn tagojn.

En lernejo, ni ĉiuj lernis, ke en la polusaj regionoj, la tago daŭras la tutan someron, la nokto la tutan vintron. Sed tion legi en libroj estas tute malsama ol tion vidi sur la loko mem, ol tion vivi.


Sur *Fuko*, apud la informejo, ĉe la karto, kie oni pikas la flage-tojn markantajn la tagmezan pozicion de la ŝipo, oni afiŝis klarigan priskribon pri la noktomeza suno. Tri konfuzaj desegnoj montras tri poziciojn de l'ĉiela sfero, de l'tera horizonto kaj de la globusa akso. La tutaĵo estas iomete malklara, kaj la teksto sub la figuraĵoj estas kelke longa.

La plimulto el la turistoj tion ekrigardas, sed ili diras : « Mi tion lernis, kiam mi estis infano ! » Kaj, ĉar, pri la lernado la plenkreskuloj estas ĝenerale pli mallaboremaj ol la infanoj, ili pasas ne serĉante kompreni. kaj ili eliras, por vidi la noktomezan sunon mem !

Cu oni povas klare komprenigi per bildoj tion, kio okazas ĉi tiu opinias.

Ni provu.

Jen unue la teoria figuraĵo, kiu la aferon komprenigas, sed ne montras la realan efekton. Videble, en ĉi tiu pozicio, kiam la tero




La Noktomeza suno.

turniĝas sur sia akso, la supra parto de la globuso estas lumigata je iu ajn horo de l'tago. Sed tio komprenigas malmulte tion, kion oni vidas, kiam oni estas persone sur tiu lumigata parto.


Ni figuru nun per la horizonta cirklo de l'desegnito A la horizontan (aŭ preskaŭ horizontan) supraĵon, kiun formas la videbla parto de vasta ebenaĵo (aŭ la videbla parto de l'mara supraĵo). La rigardanto estas meze sur la punkto R. Mi markis la nordan (N), sudan (S), orientan (E), kaj okcidentan (O) punktojn.

La sunvojiro super la horizonto, en niaj landoj, povas reprezentiĝi per la oblikva kurbo E M O.



Sunirado : mezvarma regiono.

Samnivele kun la polusa cirklo, fig. B, la suno subiras kaj levigas ekzakte ĉe la sama punkto de l'horizonto, norde, kaj ĝi estas plej




Sunirado : polusa cirklo.

alta je la dek dua horo, sude. Ĝi desegnas la kurbon N M N laŭ la direkto de la sageto.

En Spitsbergo, fig. C, la suno, je la dudek-kvara horo, estas

ankaŭ norde, sed ĝi estas super la horizonto ; kaj je la dek-dua ĝi estas pli malalte ol en la antaŭa figuro, sude. La cirklo desegnita de la suno estas preskaŭ horizontala. Por sekvi la suniradon dum la tuta tago, la rigardanto devas turniĝi rigardante laŭvice ĉiujn punktojn de la horizonto



Sunirado : polusa regiono.

ENHAV-TABELO

	Paĝoj
I. — Al la noktomeza suno	5
II. — Trans la polusan cirklon	8
III. — Insulo de l'Arkta Glacia Oceano	10
IV. — Isbergoj	13
V. — Ĉe la bankizo	15
VI. — Kiel aspektas la bankizo	18
VII. — Kiel eble plej norden	19
VIII. — Magdalena Golfeto, en Spitsbergo	23
IX. — La Spitsberga spektro	27
X. — King'a Golfeto, en Spitsbergo	30
XI. — Templ'a Golfeto, en Spitsbergo	32
XII. — En Norvegujo	36
XIII. — Ree trans la polusan cirklon	41
XIV. — Klarigoj pri la noktomeza suno	44

*
* *

Karto de la vojaĝo en la Polusaj Regionoj	4
Karto de Spitsbergo	22

171

DARÍO RODRÍGUEZ LÓPEZ DE SILVA
Galileo, 61, 6.^a MADRID



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
VIOLANDA ESPERANTO-FEDERACIO

KOLEKTO

DE FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO

unua serio : pedagogia

1. UNUAGRADA KURSO PER KORESPONDO, *de M. Rameau kaj G. Waringhien* 20 frfr.
2. FACILAJ ESPERANTAJ LEGAĴOJ, *kompilitaj de G. Waringhien* 5 »
3. GVIDLIBRO POR LA EKZAMENOJ DE S.F.P.E., *de G. Waringhien* 4 50
4. DUAGRADA KURSO PER KORESPONDO, *de M. Rameau kaj G. Waringhien* 15 »
5. TRADUKO DE LA PROVTEKSTOJ EN LA GVIDLIBRO, *de G. Waringhien* 4 50
6. POSVORTARETO, *de L. Bastien* 3 50
7. REKTMETODA ILUSTRITA KURSO, *de F. Szilagyi kaj G. Waringhien* 6 »

dua serio : beletra

21. POLUSAJ GLACIOJ SUB NOKTOMEZA SUNO, *de Joël Thézard, ilustrita per 30 fig.* 6 »
22. LA BELA HISTORIO DE JOZEF, *de Zamenhof, ilustrita per 12 desegnoj de Joël Thézard* 6 »

mendi ĉe :

S.F.P.E., 34, rue de Chabrol, Paris (10^e). (C.C.P. 855.35 Paris.)